

KATOLIKA SENTO



SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 50° - 1971

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

N-ro 1 - Januaro 1971

50a Jaro

"ĈIU HOMO ESTAS MIA FRATO"

Mesaĝo de Papo Paŭlo VI por la 1-a de Januaro 1971-a

.....

Homoj de 1971-a!

Sur la horloĝo de la mondhistorio,

la nadlo de la tempo,

de nia tempo,

signas la komencon de nova jaro:

tiu, kiun ni proponas al ni,

tute kiel en la jaroj

antaŭaj, inaŭguri

per niaj amemaj bondeziroj,

per nia mesaĝo de paco;

paco al vi, paco al la mondo.

Aŭskultu nin. Tio valoras la penon. Jes, la nia estas la kutima vorto: paco. Sed ĝi estas la vorto, kiun la mondo bezonas, kaj tiu urĝa bezono igas ĝin nova.

Ni malfermu la okulojn sur la tagiĝon de ĉi tiu nova jaro, kaj observu du ordojn de ĝeneralaj faktoj, kiuj signas per sia stampo la mondon, la popolojn, la familiojn, la individuojn. Tiuj faktoj, ŝajnas al ni, influas profunde kaj rekte niajn destinojn. Ĉiu el ni povas starigi ilian horoskopon.

Observu unuan ordon de faktoj. Verdire, ĝi ne estas ordo, sed malordo. Ĉar la faktoj, kiujn ni kun-

ligas en ĉi tiu kategorio, signas ĉiuj revenon al pensoj kaj al agoj, kiujn la tragika sperto de la milito ŝajnis esti nuliginta, aŭ estus devinta nuligi.

Je la fino de la milito ĉiuj estis dirintaj: sufiĉe. Sufiĉe pri kio? Sufiĉe pri ĉio, kio estis kaŭzinta homan buĉadon kaj teruran ruinon. Tuj post la milito, ĉe la komenco de ĉi tiu generacio, la homaro havis ekbrilon de konscio: estas necese ne nur prizorgi la tombojn, kuraci la vundojn, ripari la detruojn, redoni al la tero vizaĝon novan kaj pli bonan; sed estas ankaŭ necesa la forigo de la kaŭzoj de la suferita konflagracio. La kaŭzoj: jen la saĝa ideo; ilin serĉi, ilin elimini. La mondo trankviliĝis. Vere ŝajnis, ke estas naskiĝonta nova epoko, tiu de la paco universala. Ĉiuj ŝajnis pretaĵ por radikalaj ŝanĝoj, kun la celo eviti novajn konfliktojn. El la strukturoj politikaj, sociaj, ekonomiaj, oni alvenis al konsiderado de horizonto je belegaj novigoj moralaj kaj sociaj; oni parolis pri justeco, pri homaj rajtoj, pri levado de la malfortuloj, pri orda kunvivado, pri organizita kunlaborado, pri monda unuiĝo. Grandaj agoj estis plenumitaj; la venkintoj, ekzemple, fariĝis helpantoj al la venkitoj; grandaj institucioj estis fonditaj; la mondo komencis organiziĝi laŭ principoj de solidareco kaj komuna bonstato. La vojo al la paco, kiel kondiĉo normala kaj laŭstatuta de la vivode la mondo, ŝajnis definitive signita.

Sed, kion ni vidas post 25 jaroj de ĉi tiu reala kaj idilia progreso? Ni vidas, antaŭ ĉio, ke la militoj, tie kaj tie, furiozas ankoraŭ, kaj ŝajnas plagoj neresanigeblaj, kiuj minacas plivastiĝi kaj pligraviĝi. Ni vidas pludaŭri, kaj, tie kaj tie, kreski la diskriminaciojn sociajn, rasajn, religiajn. Ni vidas renaskiĝi la iaman pensmanieron: la homo ŝajnas reokupi poziciojn, antaŭe psikologiajn, poste politikajn, de la pasinta tem

po. Releviĝas la hieraŭaj demonoj. Revenas la superregado de la ekonomiaj interesoj kun la facila troa ekspluatado de la malfortuloj; reaperas la kutimo de la malmamo kaj de la klasbatalo, kaj renaskiĝas tiamaniere endemia milito internacia kaj civila; revenas la konkuro por la nacia prestiĝo kaj por la politika povo; revenas la konkuro de la kontraŭstarantaj ambicioj, de la partikularismoj fermitaj kaj neredukteblaj de la rasoj kaj de la ideologiaj sistemoj; oni uzas torturon kaj terorismojn; oni uzas krimon kaj perforton, kiel idealan fajron, ne pensante pri la brulego, kiu povas de tio naskiĝi; oni repensas pri la paco kiel pri pura ekvilibro de potencaj fortoj kaj de teruraj armadoj; oni resentas la tremegon de la timo, ke iu fatala nesingardo eksplo digas nekoncepteblajn kaj nebremseblajn konflagraciojn. Kio okazas? Kien oni iras? Kio ne sukcesis? Ĉu kio mankis? Ĉu ni devas rezignacii, dubante ke la homo ne kapablas realigi pacon justan kaj sekuran, kaj rezignante stampi en la edukadon de la novaj generacioj la esperon kaj la spiriton de la paco?

Bonŝance, alia diagramo de ideoj kaj de faktoj prezentiĝas al nia observado; kaj ĝi estas tiu de la paco progresanta. Ĉar, malgraŭ ĉio, la paco antaŭeniras. Estas malkontinuecoj, estas nekonsekvencoj kaj malfacilaĵoj; tamen, la paco antaŭeniras kaj firmiĝas en la mondo kun karaktero de nevenkebleco. Ĉiuj tion sentas: la paco estas necesa. Ĝi havas al si favora la moralan progreson de la homaro, decide orientita al la unueco. Unueco kaj paco, kiam la libereco ilin kunligas, estas fratinoj. Ĝi, la paco, profitas la kreskantajn favoron de publika opinio konvinkita pri la absurdeco de milito celata por si mem kaj konsiderata kiel rimedo unika kaj fatala por ĉesigi la malakordon inter la homoj. Ĝi utiligas la reton pli kaj pli densan de

la homaj rilatoj: kulturaj, ekonomiaj, komercaj, sportaj, turismaj; oni devas vivi kune, kaj estas bele reĉi proke sin koni, sin estimi, sin helpi. Fundamenta solidareco estas formiĝanta en la mondo; ĝi favoras la pacon. Kaj internaciaj rilatoj disvolviĝas pli kaj pli kaj kreas la premison, kaj ankaŭ la garantion, de iu konkordo. La grandaj institucioj internaciaj kaj supernaciaj riveleĝas providencaj, kaj ĉe la origino kaj ĉe la kronado de paca kunvivado de la homaro.

Fronte de ĉi tiu duobla bildo, kiu surmetas unu al la alia fenomenojn kontraŭstarantajn rilate al la celo, kiu estas tre kara al nia koro, nome la paco, ŝajnas al ni, ke rimarko unika, ambivalenca, povas esti eltirata. Ni metu la duoblan demandon, korelativan al du aspektoj de la ambigua sceno de la nuna mondo:

- Kiel, hodiaŭ, malfortiĝas la paco?

- Kiel, hodiaŭ, progresas la paco?

Kiu estas la elemento, kiu elstariĝas, en senco negativa aŭ en senco pozitiva, el ĉi tiu simpla analizo? La elemento estas ĉiam la homo. La homo senvalorigita, en la unua kazo; la homo, valorigita, en la dua. Ni aŭdacas uzi vorton, kiu povas ŝajni, ĝi mem, ambigua, sed konsideratan en la postulo de sia profundeco; tiu vorto, ĉiam flamanta kaj superega, estas la Amo: amo al la homo, kiel unua valoro de la surtera ordo. Amo kaj paco estas korelativaj entoj. La paco, la vera paco, la homa paco, estas efiko de la amo. La paco supozas iun "identecon de elekto". Kaj tio estas amikeco. Se ni volas la pacon, ni devas agnoski la neceson fondi ĝin sur bazoj pli solidaj ol estas tiu de manko de rilatoj (nun la rilatoj inter la homoj estas neeviteblaj, kreskas kaj firmiĝas), aŭ tiu de la ekzisto de rilatoj je egoisma intereso (ili estas nedaŭraj kaj ofte trompaj), aŭ tio de la reto de rilatoj pure kulturaj aŭ

okazaj (ili povas esti ambaŭtranĉaj, por la paco aŭ por la lukto).

La vera paco devas esti fondita sur la justeco, sur la sento de netuŝebla homa digno, sur la agnosko de neforigebla kaj feliĉa egaleco inter la homoj, sur la fundamenta dogmo de la homa frateco. Nome sur la respekto kaj sur la amo ŝuldataj al ĉiu homo ĉar homo. Eksplozas la venka vorto: ĉar frato. Frato mia, frato nia.

Ankaŭ ĉi tiu konscio pri la homa universala frateco progresas feliĉe en nia mondo, almenaŭ principe. Kiu klopodas eduki la novajn generaciojn al la konvinko, ke ĉiu homo estas nia frato, starigas el la fundamento la konstruaĵon de la paco. Kiu enigas en la publikan opinion la senton pri homa frateco sen limo, pretigas al la mondo tagojn pli bonajn. Kiu konceptas la protekton de la politikaj interesoj sen la puŝo de malam kaj de lukto interhoma, kiel neceson dialektikan kaj organan de la socia vivado, malfermas al la homa socio la progreson ĉiam aktivan de la komuna bono. Kiu helpas malkovri en ĉiu homo, trans la karakterizoj korpaj, etnaj, rasaj, la ekziston de estaĵo egala al la propra, transformas la teron el centro de dividoj, de antagonismoj, de insidoj kaj de venĝoj, al kampo de laboro organizita surbaze de civilizita kunagado. Fakte, kie la interhoma frateco estas miskonata ĉe la radiko, estas ĉe la radiko ruinigita la paco. Kaj la paco estas, male, la spegulo de la homaro vera, aŭtentika, moderna, venkinta ĉiun anakronisman sinkripligon. La paco estas la granda ideo celebranta la amon inter la homoj, kiuj sin malkovras fratoj kaj decidis vivi kiel tiaj.

Ĉi tiu estas nia mesaĝo por la jaro 1971-a. Ĝi eĥas, kiel voĉo nova naskiĝinta el la civilizita konscio, al la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj: "Ĉiuj homoj es-

tas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj; ili posedas racion kaj konsciencon kaj devas konduiti unu al alia en spirito de frateco". Ĝis tiu verto supren iris la doktrino de la civilizo. Ni ne reiru malantaŭen. Ni ne perdu la trezorojn de ĉi tiu aksioma konkero. Ni prefere apliku logike kaj kuraĝe ĉi tiun formulon, celpunkton de la homa progreso: "Ĉiu homo estas mia frato". Ĉi tio estas la paco, en la nuno kaj en la estonteco. Kaj ĝi valoras por ĉiuj !

Ĝi valoras, fratoj en la fido al Kristo, precipe por ni. Al la homa saĝo, kiu, per grandega strebo, alvenis al tiel alte kaj malfacila konkludo, ni kredantoj povas aldoni nepre necesan apogon: tiun, antaŭ ĉio, de la certeco (ĉar ĉiuspecaj duboj povas ĝin insidi, ĝin malfortigi, ĝin neniigi). Nia certeco en la dia parolo de Kristo Majstro, kiu ĝin gravuris en sia Evangelio: "Vi ĉiuj estas fratoj". Krome, ni povas doni la kuraĝigon de ebleco de aplikado (ĉar en la praktika realo, kiel estas malfacile konduiti vere frate al ĉiu homo!); ni tion povas, nin helpante, kvazaŭ per praktika kaj normala agadregulo, per alia fundamenta instruo de Kristo: "Ĉion ajn, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili; ĉar ĉi tio estas la leĝo kaj la doktrino de la profetoj". Filozofoj kaj sanktuloj kiom meditis pri ĉi tiu maksimumo, kiu enigis la universalecon de la normo de frateco en la agadon unuopan kaj konkretan de la socia moraleco! Kaj ankoraŭ, fine, ni povas liveri la superegan pruvon: tiun pri la dia Patreco, komuna al ĉiuj homoj, proklamita al ĉiuj kredantoj. Vera frateco inter la homoj, por esti aŭtentika kaj deviga, supozas kaj postulas Patrecon transcendan kaj plenplenan de metafizika amo, de supernatura karitato. Ni povas instrui la homan fratecon, nome la pacon, instruante rekoni, ami,

petegi Patron Nian, kiu estas en la ĉieloj. Ni scias, ke ni trovos barita la aliron al la altaro de Dio, se ni mem, antaŭe, neforigis la obstaklon al la repaciĝo kun la homo-frato. Kaj ni scias, ke, se ni estos iniciatantoj de paco, tiam ni povos esti nomataj filoj de Dio, kaj esti inter tiuj, kiujn la Evangelio deklaras beataj.

Kian forton, kian fekundecon, kian fidon la kristana religio donas al la ekvacio frateco kaj paco! Kaj kia ĝojo por ni rekonĝi, ĉe la koincido de la terminoj de ĉi tiu binomo, la kruciĝon de la vojetoj de nia kredo kun tiuj de la espero de la homaro kaj de la civilizoj!

DONANTE LA ESPERANTAN TRADUKON de la pa
pa mesaĝo por la 1-a de januaro 1971-a, ni scias,
ke tio ĝojigos niajn fidelajn legantojn. Kun la es-
pero, ke la vorto de la Sankta Patro helpu la ho-
mojn fariĝi pli amemaj inter si, ni aldonas al ĉiunia
aliĝinto niajn bondezirojn por paca, feliĉa, dibi-
ta 1971-a jaro.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
N° 89

OKAZE DE MEMORIGO pri la morto de Zamenhof, s-
ano L. Minnaja parolinte en nia kunveno pri la Majstro
konkludis per deklamo de inspirita poemo, kiun ni
tre volonte diskonigas al ĉiuj niaj legantoj:

ĈE LA TOMBO DE LA MAJSTRO

Spirite venis mi, pilgrima ombro
 alpelita de sento danktributa,
 kaj pie haltas ĉe l' dezerta tombo,
 kie ripozas Via cindro muta.

Antaŭ Vi, Majstro, restas mi medite:
 min rabas foren, alten, embarase
 memoraj pensoj fluaj vaghezite,
 kirliĝaj ŝtorme en la mens' amase.

Mia spirito trista kaj izola
 sereniĝas ĉe Via tomb' azila,
 je nevidebla ombro prikonsola.

Ripozu pace, granda hom' humila!

En kor' fekundis Via nobla gvido;
 zorge kulturas Via pac-armeo,
 tra l' vasta mondo, kun konstanta fido,
 la semojn de l' interna fratideo.

Kun vi en mondon venis nova sento,
 Post vi restas ĉe ni la venkespero:
 ke la amo triumfu en kunsento,
 ke la ĝojo ekfloru el sufero.

Luigi Minnaja

BONFARA KASO: Dua listo por Pakistano: £ 10.000:
 Maudente, Migliorini; 5.000: Minnaja (2^a of); 3.000
 Galeotti, E. Sias; 2.000: Bugini, Guidi, Maracchia;
 1.500: Gamberini, Viti; 1.400: Skorupa; 1.000 Pu -
 racchio-Remenyi, De Carolis, Terrazzani, Serratrice,
 Sias O., Carrubba, Amodio. Entute: £ 95.300

ALIĜOJ: Romo: St. Rejnic; V. Di Tocco; C. Canu; M.
 G. Bizzoca; S. Messina; G. Guidi; G. De Carolis; A.
 Signore; M. Serratrice; P. Coveney; V. De Benedetu

to; P. Urbajtis; Puracchio-Remenyi; C. Maracchia; A. Menabene; N. Pagliari; F. Venezia; G. Amodio; Z. Carubba; Bolonjo: E. Bugini; A. G. Gamberini; Busto Arsizio: E. Violi; Carrara: F. Poli; Genova: P. Rizzo; Pranzo di T.: G. Paicher; Ragusa: G. St. Boscari no; Reggio E. A. Fabbi; Rimini: L. Ricciotti; Sarezano; G. Barbieri; Verona: P. Bonomi; A. G. Fonta - nive; L. Terrazzani; Vicenza: G. Stocchiero; Aŭstrio K. Dürschmid; L. Schulrat; Belgujo: A. Beckers; Britujo: S. M. Sawicz; Ceĥoslovakio: V. Karulová; J. Večeře; K. Hodik; M. Svab; B. Grim; J. Babinec; M. Majtan; O. Suchančová; J. Kovalčík; J. Filip; V. Mitrowski; P. Janik; Ĉina Respubliko: J. B. Kao; Fran cujo: E. Thiollière; Germanujo: M. Renner; R. Sko - rupa; Miller; A. Wollbacher; Grekujo: K. Eliopulos; Hispanujo: Olivares N. Hungarujo: H. Tasnadi; Jugos - lavio: L. Jankovic; J. Jaklin; Nederlando: L. H. Brans; Pollando: Z. Bodecki; V. Kriszkowski; T. Nowakowski; Z. Kłopocka; A. Gucwa; J. Horodecka; A. Chomik; W. Mazur. Entute 173.

ABONO AL NIA BULTENO UECI-CECR £ 1000 (= \$ 1,60)
Oni sendu al:

poŝtĝirkonto 3-7791: D. ro C. C. Ferrari; Viale dei Mil le 37; 20129 Milano; aŭ al: pĝk. 1-37638. P. Giacinto Jacobitti; piazza S. Maria Maggiore 8; OO185 Romo.

SE VI ESTAS KONTENTA pri nia "Katolika Sento", kaj se vi deziras ricevi ankoraŭ la revuon, bonvolu mon tri tion per tuja abono.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite-, sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eb

le, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la past-ro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

NI MEMORIGAS, KE ONI POVAS de ni ricevi ankaŭ la esperantan libreton: "Vojo" (320 paĝ.) Poŝformata. 999 religiaj pormeditaj sentencoj. La libro aperis unue en la hispana; tradukita poste en multajn lingvojn, ĝi atingis 87 eldonojn kun pli ol du milionoj da ekzempleroj. (£ 1.250) Petu ankaŭ de ni la broŝuron: "La mesaĝoj de Nia Sinjorino de la Popoloj".

"PACON, SINJORO!" estas la titolo de agrabla kalendaro da religiaj poeziaĵoj, verkitaj de s-ano Luigi Minnaja. Jen titoloj de tiuj poemetoj: "Pacon, Sinjoro!", "Mia preĝo", "Al Infano Jesuo", "Alvenu regnovia", "Dia Lulkanto", "La nokto de Kristnasko", "Sankta Francisko", "Lasta preĝo", "La lasta vespermango", "Preĝo por la paco", "La kajero, kies koverto estis desegnita de P. Jacobitti, entenas ankaŭ du fotojn, koncernantajn la tekston. Nepre havinda! Petu ĝin de s-ano Luigi Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma. Libervola monofero por la Bonfara Kaso.

EN ITALA LINGVO ni presigis 4-paĝan folion: "La Chiesa Cattolica e l' Esperanto". Petu grandkvante por disvastigo (£ 6.-)

LA KONATA MUZIK-KOMPONISTO H. Benda (66 bis, Ave. de la Californie, 06 Nice, Francujo) sendis al ni ekzempleron de la esperanta "Sankta Meso" de li komponita, kaj de Kristnasko-Kanto "De la Bonaj Infantoj". Ni povis aŭdi ĉi tiun, kiu tre plaĉis al ni. Krome li havas en sia repertuaro ankaŭ aliajn verkojn por solkantistoj kaj ĥoroj. Li estas preta sendi ilin senpa-

ge al ĉiuj, kiuj deziras ilin interpreti. Ekde nun ni tre dankas lian grandan ofere^{mon}!

SE VI POSEDAS ESPERANTAĴOJN, kiuj ne plu utilas al vi (Revuojn, Gazetojn, bultenojn, cirkulerojn, lib^{rojn}, prospektojn, broŝurojn, afiŝojn, glumarkojn, kar^{tojn}, kovertojn, insignojn, poŝtmarkojn, poŝtstampojn, fotojn k.t.p.), bonvolu kontakti kun D-ro Antonio De Salvo, Via Olbia 15, OO182 ROMA, Telef. 751619: vi povos samtempe kaj tute senkoste feliĉigi nian samidea^{non}, kontribui al propagando de esperanto, kaj liberi^{gi} vian hejmon de spacorabaj objektoj!

RADIO-ROMA - ESPERANTO. Januaro 1971-a.

Dimanĉon la 3-an: Tra la literaturo; la 10-an: Novaĵoj el Italujo; la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto; la 24-an; Leterkesto; la 31-an: Kristana mondo. La dua par^{to} de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendos okazas de h. 21.00 ĝis. 21.20 (M.E.T.). Ondlongoj: 30,90 - 41,24 - 50,08.

P.ALBINO CICCANTI, prezidanto de UECl, okaze de vizito al siaj parencoj en Aŭstralio, ne forlasis la esceptan okazon diskonigi Esperanton, precipe en la katolika kampo. La Sekretario de la Katolika Esperantista Aŭstralia Asocio, s-ro V.J. Timmins, raportis al ni, kiel la Sidnejaj esperantistoj bonvenigis lin en sian so^{cieton} kaj en la Manlyan (antaŭurbo) Esperanto-Klubon. Ili aktive helpis lin, kaj pro iliaj zorgoj la plej grava tagĵurnalo, la Sydney Morning Herald (Sidneja mate^{na} heroldo) intervjuis lin, la 17-an de novembro, kaj ricevis lin Kard. Gilroy, interesigante afable pri lia es^{perantista} agado. Ĉeestis tiuokaze krom sro Timmins, ankaŭ s-ro K. Smith, U.E.A. Delegito kaj s-ro J. Matasin, bone konata eksterlande pro siaj multaj vojaĝoj kaj prelegoj. En Aŭstralio troviĝas c. 1400 esperan -

tistoj, kaj tiel P. Ciccanti trovis multajn simpatianojn; sed krome, li altiris per sia simpla, serena, amika sinteno, la intereson de multaj aliaj personoj, precipe ĉe skoltoj, lernejoj kaj eĉ Universitato de Newcastle, kie li prelegis. La Katolika esperantista mondo estis de li reprezentita ĉiam kaj ĉie en la plej efika kaj alloga maniero.

.....

El Romo, centro de Katolika mondo, kelkajn informojn pri la vivo de l'Eklezio:

.....

LA GRANDA VOJAĜO DE LA PAPO al la Ekstrema Oriento daŭris 9 tagojn: de la 26-a de novembro, ĵaŭde, je la 10 h., ĝis la 5-a de decembro, je la 4-a kaj duono. Ne multaj tagoj sed eksterordinare densaj. Ni klopodos, tre resume, mencii ion el la plej gravaj okazintaĵoj.

Startinte de la Roma flughaveno Fiumicino kun la salutoj kaj la bondeziroj de civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj, la unua etapo de Paŭlo VI, post kvarhora flugado, estis Teherano, kie li estis salutita de la ŝtatestro, ŝiao Reza Pahlavi; kaj tuj, preskaŭ nokte, al Dakao en Pakistano, kien li volis iri por montri per sia persona ĉeesto sian zorgon pro la teruraj danĝeroj kaŭzitaj de huragano. "Mi venis al vi - li diris - kiel amiko al amikoj, kiel frato al fratoj, por diri al vi, kiom mi partoprenas en via sufero". Kaj li volis per si mem doni, kiel ateston de kunhelpo, cent mil dolarojn al la prezidento Yahya Khan, kaj cent mil al reprezentanto de la katolika komuno. Ankaŭ la ĵurnalistoj, kiuj sekvis la Sanktan Patron en lia vojaĝo, volis doni per liaj manoj sian kontribuaĵon. Dum la alveno de la papo ne interrompiĝis en la flughaveno la intensa laboro de

malŝarĝoj el aviadiloj de ĉiuspecaj varoj, senditaj de internaciaj entreprenoj, inter kiuj multaj de la katolikaj.

El Dakao fluginte al Manila, kien li alvenis vendrede, je la 9,25 h. la papo estis akceptita de la prezidento de la Filipinaj insuloj, Ferdinando Marcos. Ĉi tie, antaŭ la ĉeesto de ĉiuj civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj, okazis atenco fare de iu duonfrenezulo, kiu klopodis murdi la papon kun tranĉilarmita mano. Dio ne permesis, ke la Vikario de Kristo estu trafita, kaj ke la ĝojo de du-tri milionoj da personoj, kiuj el ĉiu parto kunvenis por saluti la papon, estu ŝanĝita al konsterno. Menze de du vicoj de festantaj personoj, la papo, montrante nenian malkvieton, serena, benadanta, iris tuj al la katedralo, kie kuncelebris kun la aziaj episkopoj. Antaŭ la escepta amaso de sacerdotoj, la papo reliefigis la viglecon kaj riĉecon de la Filipina eklezio, invitante ĉiujn al konstanta fervoro.

Renkontiĝojn li havis kun civilaj kaj religiaj aŭtoritatoj; kaj aparte memorinda, la 28-an de novembro, kun la ducent mil studentoj de la 13 Filipinaj universitatoj, kuniĝintaj subĉiele en la "campus" de la universitato "Sankta Tomaso". "Ni komprenas vian aspiron - diris Paŭlo VI al ili - por pli aktiva agado favore al via popolo. Kaj mi indikas al vi la mesaĝon de Kristo, kiun li transdonis al sia eklezio por la tuta mondo: en tiu mesaĝo estas la respondo al la homaj aspiroj". Post unu horo, en la aŭlo de la sama universitato, kie troviĝas la sidejo de la katolika televida entrepreno "Radio Veritas", la papo prezidis la laboran kunsidon de la tutazia episkopa konferenco, kiu kunigis 180 episkopojn de Cejlono, Formoso, Hongkongo, Koreo, Novgvineo, Guamo, Hindujo, Pakistano, Malajo, Singaporo, Tajlando, Vietnamo. Memorigante ilian respondecon antaŭ la

mondo, kiel postsekvantoj de la apostola Kolegio starigita de Kristo, la papo laŭdis la nerezisteblan volon de Azio, okupi la lokon, pri kiu ĝi rajtas en la mondo, kaj admonis la episkopojn, ke ili donu al la mondo la lumon de la kredo en unueco, karitato, paco, solidareco kaj kunlaboro: tiujn taskojn ili ricevis de Kristo por la spirita gvidado de la homaro. Senlace, poste, la papo ekzamenis kaj pridiskutis la Koncilajn konkludojn. Impresiga trihora ceremonio estis vespere la samtempa ordino de 200 novaj sacerdotoj en la vastega "Luneta park", sekva ta de la unua komunio al multaj infanoj. Ĉiuj bezonas - li diris al la unuaj - la helpon kaj asistonton de sacerdoto. Dum ĉi tiu materialisma epoko la sacerdota vivo estas pli necesa ol iam". Dum la sama tago li akceptis ankaŭ delegaciojn el Cebù, Filipina diocezo, gvidata de kard. Julio Rosales; kaj de Vjetnamo, kio donis al li eblecon esprimi la ardan sopiron de la eklezio por la paco; kaj fine la apostolajn nunciojn de la aziaj nacioj, al kiuj li memorigis, ke ankaŭ ilia laboro devas esti inspirita de animzorga celo.

La trian tagon de la papo en Manila, dimanĉe, la 29-an, okazis en la "Quezon circle" solena meso kun la ĉeesto de du milionoj da personoj. Dum la prezentado de la oferoj, reprezentantoj de la diversaj kategorioj kaj de la 7.000 Filipinaj insuloj viciĝis kun siaj donacoj. En sia homilio la papo akcentis, ke ankaŭ por la pozitiva kaj feliĉa evolua solvo de la nunaj sociaj kondiĉoj, kiel por ĉiu tempo de la homara vivo, Kristo aŭdigas sian vorton, faras siajn mirindaĵojn, ne nur en la spirita, sed ankaŭ en la fizika sfero. "Ke oni vere fidu al li kaj el li oni eltiru la principojn de energia, socia ordo, por

daŭra renoviĝo kaj progreso". "Neniu pli ol Kristo - diris la papo - kiu rivelis al ni la dian patrecon, povas, fakte paroli al ni pli vere pri frateco homa. Kaj ĉu la aŭtentika libereco ne devenas de tiu nobleco, kiun donis al ni Kristo, Dio, fariĝinte pro amo kiel unu el ni?" Kaj aparte parolante al studentoj, al laboristoj, al riĉuloj kaj malriĉuloj, la papo klarigis al ĉiu homkategorio la dian mesaĝon.

Sed pli solenan mesaĝon la papo dissendis el la aŭditorio de "Radio Veritas", konklude de la episkopa Konferenco "al la sennombraj milionoj da azianoj, ĉiuj niaj filoj en Kristo". La papo agnoskis, ke la azianoj, altiritaj al spirita sento per siaj jarmilaj religioj, kiuj penetris la tutan socian sferon kaj la individuan konsci^{en}con, kiuj donis al ili disciplinan kaj moralan inkli^{on}on kaj integrecon al ilia familio, troviĝas nun antaŭ la danĝero de materialismo kaj ateismo. "Ĉiuj popoloj an^{kor}aŭ religiaj kaj iliaj regantoj devas sin defendi kaj l^uktadi kontraŭ tiu komuna ruiniga danĝero. La nunaj ka^{to}tolikoj havu la apostolan spiriton de la unuaj; kaj ili es^{to}s ne nur la defendo, sed la plej taŭga fermento de pro^{gre}so en Azio". Kun la kunsento al ĉiuj suferantoj pro la naturaj danĝeroj, kiel ĵus en Pakistano, kaj pro la milito, kiu de longe fluigas sangon kaj okazigas rui^{no}jn, la papo donis al la katolikoj sian benon, al ĉiuj e^ssprimis sian altan estimon.

La saman tagon, post aŭdienco al ĵurnalistoj, la papo benis novajn domojn. Kaj vizitante la plej malriĉan kvartalon, Tondo, la papo adresis patrecajn vortojn al la malriĉuloj: "La eklezio vin amas kaj pledas por viaj homaj rajtoj. Ĝi volas helpi vin materie kaj spirite; fi^{du} en la eklezio de Kristo, kiu volis esti malriĉa kiel vi, kiu rivelis al la mondo: Beataj la malriĉuloj laŭ spi^{ri}rito, ĉar al ili apartenas la regno de la ĉielo".

Salutinte delegacion de ne-kristanoj kaj hebreoj kaj grupon de tradukistoj de la S. Biblio en la lokajn lingvojn takalogan kaj ilokanan, la papo je la 18-a h. de la dimanĉo, 29-an de novembro, forlasis la Filipinajn insulojn por la Samoa-aj. Unue al Pago-Pago, poste al la okcidenta Samoa per alia flugado. La komuno de tiuj insuloj, regata de Malitoa Tanumafili II, havas nek armeon nek policistaron, kaj estas fekunda grundo, kie la semo de la dia vorto donis stabilajn fruktojn. La vizito de la papo okazis en la paroko de Leulomoega, en insulo Upolo, diocezo de Apia. Oni povas aserti, ke ĉiuj el la tri mil loĝantoj partoprenis en la akcepto. El tiu ideala misia lando la papo, unue parolante afable kaj simple al la loĝantaro, leviĝis baldaŭ al sia plejalta paŝtista rango, kaj lanĉis al la mondo misian mesaĝon: "Ankoraŭfoje ni aŭdas la alvokon: Venu al ni, venu nin helpi! (Ag.16:9). Pro tio ni transdonas al ĉiuj malavaraj koroj la dian inviton: Forlasu vi an patrujon, familion kaj hejmon, kaj iru en la landon, kiun mi montros al vi (Gen.12:1). La apostolaj episkopoj, sacerdotoj, religiuloj kaj religiulinoj, junuloj kaj adoltoj aŭskultu la dian alvokon; ĉiuj aliaj kunhelpu!

Je la 14-a h. la papo denove estis en aviadilo, ĉifoje sin direktanta al Aŭstralio. Kaj lunde je la 8,30 h. li alteriĝis ĉe Sydney, ricevita de sir Paul Haushack, gubernatoro de la Aŭstralia Federacio, de kard. Norman Gilroy, de John Gorton, ĉefministro kaj de multaj aliaj aŭtoritatoj. Salutante ilin kaj la multenombrajn homamason, la papo diris: "Kristo, kies evangelio estas paca evangelio, ordonas al ni disvastigi senlace lian mesaĝon, por inciti la homojn sindediĉi al konstruo de tiuj kondiĉoj, kiuj certigas al ĉiu firmecon en la paco, al kio ĉio kunligiĝas. Dio benu Aŭstralion kaj ĉiujn viajn bonajn entreprenojn!" Laŭlonge de la 10 kilo

metra vojo al la katedralo li salutis la ĉiam nenombre-bl^{an} popolamason. Vespere li celebris en la katedralo, kie atendis lin 3500 sacerdotoj kaj religiuloj; deklaran^{te} en sia homilio, ke li venis por sperti, fortigi, celebri en Kristo la unuecon de l'Eklezio.

La sekvant^{an} tagon, 1-an de decembro, je la 9-a h. la papo prezidis la episkopan konferencon (70 episkopoj) de Aŭstralio, Novzelando, Papuo-Novgvineo kaj Oceanio. "Tamen - li diris - mi venis al vi ne nur por paroli al vi, sed ankaŭ kaj precipe por aŭskulti vin." Temo de lia parolado estis unueco de kredo - unua komunio en la eklezio -, kiu tamen ne kontraŭstaras ian plurismon, respekt^{em}an de la esenca unueco de la kristanismo; kaj unueco de karitato - dua aspekto de la katolika komunio -. "Unueco en kredo kaj en amo estos la kristana atesto, kiu influos save en la mondon". En la sama katedralo sekvis, post la episkopa kunsido, la renkontiĝo kun 4.000 aŭstraliaj sacerdotoj. Posttagmeze li vizitis la plej altajn aŭtoritatojn; poste li akceptis la membrojn de la diplomata korpuso kaj la gvidantojn de katolikaj organizoj: por ĉiu kategorio li havis apartan saluton kaj taŭgajn vortojn.

Fine en la hipodromo de Randwick, je la ĉeesto de kvincent mil personoj la papo celebris la meson kun multaj episkopoj, inde solenante la duan jarcenton de la malkovro de Aŭstralio. "Ĉiu homo - diris la papo en sia homilio - kiel same ĉiu socio, havas sian historion. Vi, kiuj reprezentas ĉi tie apartan popolon, devenantan de renkontiĝo de homoj tiel diversaj pri nacieco, lingvo kaj kulturo, vi bone scias, ke via vitala impeto, via amo por la laboro, via iniciatemo, estas la viva heredaĵo, kiun transdonis al vi la pionira spirito de viaj antaŭuloj. Sed ni ne povas rigardi la historion kiel blindan evoluon de hazardaj cirkonstancoj: nur Dio regas

la historion".

Merkrede, la 2-an de decembro, post vizito al la Royal Alexandra Hospital, la plej granda porinfana hospitalo de la Sud-Nova Kimrujo kaj unu el la plej grandaj en la mondo, kie li transdonis benojn, konsolajn vortojn kaj donacojn al la malsanuloj, je la 11,30 en la sama hipodromo kuniĝis pli ol ducent mil studentoj, kiuj salutis la papon kun ne priskribebla entuziasmo. "Ĝuste estas intima kunligo, karaj gejunuloj, - agnoskis la papo, parolante al ili dum la meso - inter via kredo kaj via vivo. Ĝuste en tiu malkontento, kiu vin turmentas, en via kritiko al tiu socio, kiu hodiaŭ estas rajte dirita permesiva, troviĝas luma elemento". Du horojn poste la papo ricevis aparte la reprezentantojn de la gazetaro; la urban konsilantaron; la pranepojn de la unuaj aŭstraliaj loĝantoj; kaj reprezentantojn de ne kristanaj komunoj. Fine, je la 20-a h. ĉe la Town hall, Paŭlo VI prezidis ekumenan diservon kun la partopreno de reprezentantoj de kristanaj kaj ne kristanaj komunoj. Dum la ceremonio parolis la papo, la prezidanto de la Aŭstralia Konsilio de la Eklezioj kaj la anglikana episkopo de Gippsland, Garnsey.

Unu el la plej emociaj momentoj inter tiom da celebradoj estis kiam, ĵaŭde, 3-an de decembro, je la 8a h. la papo, en la katedralo neimageble plenplena, transdonis la episkopan ordinon al la unua papua episkopo, mons. Louis Vangeke. Kiam la papo ĉirkaŭprenis kaj kisis la novan episkopon, kaj kiam li sendis lin tra la preĝejo por doni sian unuan benon al la ĉeestantaro, la papo ne kapablis regi sian emocion: oni vidis lin ekplori.

Je la 11,45 la papo estis denove en la flughaveno por transpasi al Ĝakarto, kien li alvenis post 7 flughoroj.

roj. En sia unua saluto al la lando, kie renkontiĝas ĉiuj grandaj kredoj de la mondo, la papo konfirmis, ke la katolika eklezio, agnoskante ĉion bonan, spiritan, moralan en ĉiu religio, devas fariĝi vorto, mesaĝo, dialogo kun la mondo. Unue, vizito al la katedralo; poste al la prezidento Sukarno, kaj vespere en la senmezura stadiono, plenigita ĝisekstreme de la fidelularo, la papo celebris la meson, dum sur la altaro, en podio subtenata de enorma mano ĉeestis la plej altaj civilaj kaj religiaj ŝtataj aŭtoritatoj. "Admirinda estas la religia sento en via lando, - proklamis la papo - ĉar en la diverseco de tiom da kredoj, ĝi agnoskas en sia konstitucio, kiel pilastron de sia unueco kaj forto, la kredon en la ĉiopova Dio... La kristano vidas kaj rekonas la radiojn de la dia vero dissemitajn en ĉiu religio, konante la misteron de Kristo, en kiu ĉio vivas, al kiu ĉio celas, laŭ la plano de Dio". Ricevante la omaĝon de diversaj religiaj ĉefoj, la papo donacis por la diversaj hospitaloj, la musulmana, la katolika kaj la protestanta, 4 komplete ekipitajn aŭtoambulancojn.

Dek ses horoj pasis en la jam nun kutima vico da vizitoj, renkontiĝoj, paroladoj; kaj je la 8,20 vendrede, la 4-an de decembro, la aviadilo de la papo leviĝas en la ĉielo, cele al Hongkongo, "la plej granda ĉina diocezo, kun 247.000 katolikoj en 53 parokoj". La tre delikata politika situacio, pro la senpera proksimeco de Ĉinio, konsilis la aŭtoritatojn limigi laŭeble la manifestaciojn, al kiuj ne povis partopreni grandnombre la Formosa eklezio. Alveninte al la urbo, kaj salutite de la adjunkta guberniestro, sir Hugh Norman Walker, de la episkopo, mons. Francisko Hsu, de aliaj aŭtoritatoj, de sennombra kredantaro, la papo pere de helikoptero atingis la hipodromon jam plenigitan de miloj kaj miloj da personoj. Memorinda spektaklo la papa meso, kun

partopreno de diversaj episkopoj kaj 200 sacerdotoj ! En sia parolado la Sankta Patro ripetis kun kortuŝa inspiro, alvokon al amo. "La eklezio estas frukto de la unuiga amo de Kristo al ni, kaj la eklezio mem povas esti rigardata kiel sakramento de unueco kaj amo. Ami estas ĝia misio". "Dum ni ripetas ĉi tiujn simplajn kaj altajn vortojn, ni preskaŭ sentas ĉirkaŭ ni la tutan ĉinan popolon, kie ajn ĝi troviĝas. Nur unu vorton ni diras al ĝi: Amo! Kristo estas ankaŭ por Ĉinio la ama Majstro, Paŝtisto, Elaĉetanto".

De Hongkongo, kie la papo restis du horojn, li reprenis sian lacigan vojaĝon al Cejlono, la lasta etapo de tiu misia vojaĝo. Li atingis la flughavenon de Kolombo je la 20.05 h., akceptita de la ĝenerala gubernatoro William Gopolawa, de la ĉefministro, s.ino Sirimavo Bandaranaike, de kard. Tomaso Cooray kaj de multaj aliaj eminentuloj. Oni rimarkis ankaŭ multajn bonzojn de la Budda sekto "Siamo". Ankaŭ ĉi tie, ĉe la flughaveno atendis lin centoj da miloj da personoj. Sur altaro konstruita de bonzo Mapalagama, la papo celebris la meson, komentitan en la lingvoj tamila, cingala, angla kaj latina; kaj responde al la homaĝa saluto de kard. Cooray, la papo dankis lin kaj la tutan ĉeestantaron, kiu alkuris al li, Vikario de Kristo. Proklamante sian unuiĝon kun la tuta Cejlona eklezio en la unika mistika Korpo de Kristo, la papo alvokis la ĉielan Dipatrinon kaj Reĝinon de Cejlono, Maria, por ke ŝi akceptu el liaj manoj la tutan familion de Lanka. Al la kardinalo la papo donacis 20.000 dolarojn por la leprulejo de Colombo. Tri horojn post lia alveno, jam la papo suriris denove la aviadilon por sia reveno al Romo.

Tiel finiĝis la granda vojaĝo de la papo: dum 9 tagoj, 50.000 kilometroj kaj 68 flughoroj; kun halto en

dek ŝtatoj el tri kontinentoj , kaj pli ol 50 paroladoj por sentigi ankaŭ al tiuj plej malproksimaj popoloj la baton de la koro de la eklezio kaj paroli al la mondo la mesaĝon de Kristo. Ni volas fermi ĉi tiun priskribon, raportante lian alparoladon mem, faritan la 6-an de decembro dum la ĝenerala aŭdienco, kiun li kutime donas el sia fenestro al ĉiuj, tiuokaze preskaŭ 50.000 personoj, kuniĝintaj en la placo S. Petro:

"Tre karaj!

Ni dankas vin ĉiujn pro via ĉeesto, kiu hodiaŭ reliefigas specialan intencon, sugestitan de la boneco de nia Kardinalo Vikario, veni en placon de Sankta Petro, je la horo de nia dimanĉa "Anĝelus", por esprimi al ni vian saluton je la reveno el nia rapida kaj longa vojaĝo al Orienta Azio, al Aŭstralio, al Indonezio, al Hongkongo kaj al Cejlono. Vi volas tiamaniere danki kun ni la Sinjoron, kiu donis al ni la intencon fari ĉi tiun vojaĝon kaj la protekton por plenumi ĝin feliĉe, kaj kiu, krome, gardis nin kontraŭ la atenco de frenezulo, ago absolute izolita kaj restinta bonŝance sen iu ajn negativa sekvo. Ni eksciis pri la vibrado de malaprobo kaj de sindono, kun kiu, fare de la Aŭtoritatoj, de la publika opinio kaj de vi, Romanoj, speciale, estis akceptita la anonco pri tiu epizodo; kaj tial ni sentas nin devigitaj esprimi al ĉiuj nian kortuŝitan dankon.

Ni estas al vi aparte dankoŝuldaĵ pro tio, ke vi sekvu nin spirite, kun via penso kaj kun via preĝo. Ankaŭ ni konstante memoris pri vi, kunligante tiel la memoron pri vi, la memoron pri Romo, kun la renkonto de nia apostola pilgrimado, kaj tiamaniere penetrante, ankoraŭfoje, en la signifon de la universala misio de Romo. Belegaj renkontoj; sendube vi ekkonis ilin pere de la gazetaro, de la radio kaj de la televido; kaj ni volas kredi, ke ankaŭ vi perceptis, iumezure, ĝian valoron religian kaj eklezian; ĉi-lastan precipe, kiun certe ne

povis naski la malgrandeco de mia persono, sed la fakto, ke ni venis el Romo, el la centro, el la koro de la katolika Eklezio, ni posteuloj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo, ke ni venis, do, por ĉiuj fideluloj, por ĉiu episkopo, kiel fratoj kaj amikoj, kaj kiel reprezentantoj, laŭ jarcenta misio, de Kristo mem. Senmeritaj kaj ni mem mirigitaj pro la spirita fenomeno, ni sentis nin kvazaŭ hostimontrilon de la mistero, ĉie konata kaj celebrata, de Kristo ĉeestanta en la historio, en la eklezio kaj en la mondo. Vere ne al la humila homo, kia ni estas, leviĝis la sennombraj kaj entuziasmaj aklamadoj de la amasoj ĝojegantaj, sed al Tiu, kiun oni volas vidi specialmaniere aganta en nia apostola kaj paŝtista ofico, al Kristo mem, ni diras, kiu, eĉ aperante en tiel modesta formo, vekis en ĉiuj pli intensan konscion pri tio, kio estas la Eklezio: familio de vivantaj homoj, de personoj transfiguritaj en filojn de Dio, komunumo unuigita kaj cementita de identa kredo, de unika spirito de amo kaj de solidareco.

Io granda estas la eklezio: realaĵo kaj mistero samtempe. Ankoraŭfoje ni komprenis, tre klare, kiom ĝi estas farita por la mondo; eĉ por la hodiaŭa mondo: ĵu pli ĝi aperas kiel homaro sennombra, junularo eksplodanta je vivo kaj angoroj, societo mirinde evoluinta sed ankoraŭ suferanta pro netolerebla malabundo kaj pro kunnaskita kadukeco, des pli ĝi montriĝas preta kaj sekrete avida al supera savo, kiun nur Kristo povas doni, kaj de kiu la eklezio estas administranto kaj antaŭanonco.

La tuta katolika eklezio rigardas al Romo, kaj volus en ĝi trovi la ekzemplan bildon pri si mem, fidelan al la saĝo de la evangelio kaj al ties misia karitato. Rigardas al Romo ankaŭ la kristanoj ankoraŭ ne repaciĝintaj kun ĝi, rigardas la aliaj religioj, rigardas ankaŭ la mondo civila kaj profana; ĉiuj, iumotive, rigar

das ĉi tien. Ni, vojaĝante perceptis ĉi tiun konverĝan rigardon, jen amikan kaj sindonan, jen scivoleman kaj kritikan, jen eĉ suspektaman kaj verŝajne malfideman, sed kiu ĉiam klopodas serĉi en Romo la travivatan ates ton pri ĝia asertita aŭtentikeco religia kaj homa.

Tial al vi ni ne povas kaŝi la amarecon pro la scii-go, kiu atingis nin laŭlonge de nia vojaĝo, pri la aprobo de la leĝo celanta enkonduki la divorcon ankaŭ en Italujon. Okazaĵo, kiun pro multaj motivoj, kaj precipe pro la amo, kiun ni sentas al la itala popolo, ni taksas malfeliĉa.

Sed ĉi tiun fakton ni volas ĝuste mencii nun, por ke ankaŭ en vi, kiel en nia animo, kresku en la amo la kon scio pri la nomo "katolikoj"; neniam forgesu pri ĝi, sed estu al ĝi ĉiam fidelaj, kaj estu ĉiam konsciaj, ĉiam animitaj de viva kaj lojala amemo al ĉi tiu via lando kato lika, forta kaj libera, kaj kiu havas la providencan sor ton gastigi, aparte kaj sendepende, la Apostolan Se ĝon.

Vin kuraĝigu en ĉi tiuj altaj kaj serenaj sentoj la sa lutoj, kiujn ni portas al vi el la Eklezioj kaj el la gen toj malproksimaj, de ni vizititaj en la nomo de Kristo.

oo

KIEL KATOLIKO POVAS OPINII pri Lutero? Celante e kumenajn kontaktojn kun protestantismo kaj klopodante por pli profunda klarigo de la protestanta doktrino, ofte kaj ĉie oni organizas studkunvenojn, oni klopodas starigi dialogojn, oni skribas artikolojn kaj librojn. Inter ĉi tiuj apartan gravecon atingis la libro "Lutero" de p. Karolo Boyer, S.J., kiu estis prezentita en Romo la 27-an de novembro. La aŭtoro, de multaj jaroj profesoro pri teologio kaj ekumenismo, ŝajnas la plej kapabla por lumigi la figuron de Lutero kun ekumena ce lo, el lia doktrino mem. Li agnoskas, ke malfacila afe

ro estas doni objektivan prijuĝon pri persono, kiu vekis la plej kontraŭajn sentojn de admiro aŭ de malaprobo. Esti tamen neŭtralaj aŭ indiferentaj pri Lutero, ne taŭgas al la ekumena kaŭzo. Lutero, certe, ne ĉion rifuzis, kio estas instruata de la katolika kredo. Kaj pri tiuj rifuzoj oni povas esti certaj, ke se li estus koninta anstataŭ Okkam, sanktan Tomason de Akvino, lia pozicio estus alia. Pro tio, laŭ la aŭtoro, protestanto devas progresigi kaj profundigi la teologion de Lutero, forigante liajn apartajn personismajn vidpunktojn, dum la katoliko povos trovi multajn akcepteblajn aspektojn de lia doktrino, kiel fakte faris la Koncilo, ĉe ne mal multaj protestantaj tezoj. Ŝajnas al ni, ke utilos al niaj legantoj transkribi la dezirplenajn, sed prudentajn vortojn parolitajn pri Lutero de kard. Willebrands antaŭ la V-a Asembleo de la Luterana Tutmonda Federacio. Tion ni faros, espereble, en la venonta numero, pro la nesufiĉa spaco de ĉi tiu, kiu, al la kutimaj diversaj informoj pri la agado en la mondo de la katolika eklezio, preferis ĉifoje paroli pli vaste pri la ĵusa misia vojaĝo de la papo.

.....

NI DANKAS AL ĈIUJ, KIUJ REABONIS nian bultenon. Por montri, kiom ni celas ankaŭ laŭ ĝia aspekto plaĉi al ili, la UECI-Vicprezidanto Don F. Longoni, volis pretigi por ĝi dum la nuna jaro, jubilea por UECI, speciale allogan koverton. Ni esperas, ke ĝi altiros eĉ pli la intereson de niaj katolikaj esperantistoj.

.....

.....